



FN PER ANC 47

Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL-TRIMONATA BULTENO

Nº42 (nova serio) - Nº127a - Decembro 1977

REDAKTAS: Sino Pottier 21 allée des Roitelets 76130 YVETOT.

Sendu la manuskriptojn antaŭ la: 40a de februaro - 40a de majo -
40a de aŭgusto - 40a de novembro.

Eldonita de: La ESPERANTO-GRUPOJ de la RUENA REGIONO.

EKSPEDAS: Maryse + Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 ROUEN

UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE: ccp: 283.40.H.ROUEN

KOTIZOJ: Minimuma Kotizo: 7,00 fr. - SubtenKotizo ek de 10,00 fr.

Nura abono al NORMANDA ESPERANTO BULTENO sen membreco: 7,00 fr.

"La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj."

NORMANDOJ VOJAĜAS

LETERO EL TAMANRASSET

Unu el la pasintjaraj lernintoj de S-ro Chalm, forlasis Le Havre por efektivigi sian de longe pripensitan deziron: ĉirkaŭkuri la tutan mondon! Jen lia unua raporto, ricevita dum la libertempa periodo.

.... Mia starto estis hasta, kaj mi ne havis tempon saluti vin, malfeliĉe. Mi deiris de Parizo la 2an de Julio kun grupo de 4 aŭtoj 404 Peugeot kiuj iras al Nigerlando ĝis la urbo Agadès. Mi estas dek personoj. Ni travejaĝis Francujon, Hispanujon ĝis Gibraltaro. Post tri tagoj en Maroko, ni alvenis al Alĝerio ĉe la urbo Tlemcen; tre rapide, ni iris ĝis la oazoj de Sahara: Ghardaïa, El Golea, In Salah - la palmiroj, la pura akvo, la suno. Post la oazo de In Salah, la vojestreko komenciĝas kaj estas tre malfacile. La pejzaĝoj estas eksterordinaraj.

Estas 480 km por iri al Tamanrasset kie mi estas de kelkaj tagoj. Ĝis nun, mi ne havas multajn problemojn kun la aŭtoj. La baldaŭa etapo estos longa kaj malfacila: proksimume mil kilometrojn da vojestreko kun malmulte da akvoputoj. En Agadès, la aŭtoj estos vendataj kaj ni disiĝos; unuj iros al orienta Afriko, aliaj al Okcidenta Afriko. Persone, mi ĝatus viziti la regionon de Agadès, kie la Touaregoj vivas, kaj vidi la regionon de Tombouctou, en Malio. Fine, mi pensas veni al Dakar en Septembro, por trovi ŝipon aŭ velŝipon kiu forigos min al Suda Ameriko en Brazilo por vivi la karnavalon.

Ĝis nun mi estas vere kontenta pri tiu vojaĝo. Mi esperas ankoraŭ doni al vi bonajn novaĵojn

Samideano Jean François

- Polycopié par le Groupe ESPÉRANTISTE ROUENNAIS - DÉPOT LÉgal 4^e TRIMESTRE

Le GÉRANT: P. Lemarchand.

1977.

LETERO EL DAKARO

En Le Havre, ni sekvas la mondroniron de nia amiko Passarella. Post lia unua letero, el Tamanraset, jen ekstrakto el la dua, venanta el Dakaro

...Tie-ĉi en Afriko, la vetero estas ĉiam sunbrila, precipe en Sahara, malgraŭ ke, dum tiu sezono (somero), mi vidis sabloventojn en la regionoj de In Guezzam (Suda Algerio), Arlit, kaj Agadez (Nigerlando) precipe unu sablovento dum mia vojaĝo per kamelo inter Arlit kaj Agadez estis eksterordinara. Tie ĉi en Dakaro, la vetero estas suna sed kun vento: estas tre agrable

... La Francoj kaj la blankuloj estas estimataj, eble tro estimataj ĉar la negroj havas ankoraŭ malsuperkompleksojn: la dialogo estas kelkfoje malfacila, favore la junularo reagas.

La Afrika gastamo ne estas legendo: la negroj partigas facile kun tiuj kiuj havas nenion, aŭ kun la vojaĝantoj. Mi estas gasto ofte, precipe en Malio kaj Senegalio.

Se vi vivas kun la negroj, la vivo ne estas multekosta por la blankuloj, sed ĝi estas malfacila por la negroj: ili vivas per malmulto! Ili dormas surplanke, kaj ofte surtere; ili manĝas precipe rizon kun malmulte da viando aŭ fiŝo. La Negroj havas malmulte da pano kaj, en la urbo, multaj junuloj ne havas laboron: tiu senlabora junularo vivas dank'al la malavara familio, sed tio ĉi ne estas sen problemoj. La senlaboreco estas la unua problemo en Afriko, la dua estas la koruptado. Jes, estas multaj problemoj tie ĉi, kaj sen evidentaj solvoj.


Proksime de Mopti, vi trovas originalan regionon kiun oni nomas "Pays Dogon" en la regiono de Bandiagara kaj Sangha; la vilaĝoj estas strangaj kun siaj milgrenejoj. En Koulikourou, proksime al Bamako, estis tre malfacile, ĉar oni povis trovi nenian lokon por dormi, tiam estis da homoj tie: mi restis tri tagojn sen dormo. En Bamako, mi veturis per trajno al Senegalio ĝis Tanka-Counda kun Senegaliana amiko. En tiu ĉi urbo, mi loĝis ĉe marabuto kiun oni nomas Thierno; mi restadis tie unu semajnon kaj foriris por Dakaro, kie mi loĝis ĉe alia amiko dum du semajnoj. Nun mi loĝis ĉe francaj amikoj en domo borde de la maro; estas malgranda sablobordo. La vivo pasas tre agrable

Mi ne scias kiam mi povos foriri el Senegalio; eble morgaŭ se mi trovos ŝipon al Las Palmas aŭ Suda Ameriko, eble post pluraj semajnoj, sed tio ne estas grava: tie ĉi la tempo ne estas sama

Dankon por via letero kiu min plezurigis

Samideano Johano Francesko.

**CONVULU RICEVI NIAJN PLEJ
VARIAJN BONDEZIROJN POR 78**



RADIO - ELSENDOJ

3

MI HONTAS !

Oni plendas ke la oficialuloj ne okupiĝas pri Esperanto !
Kelkaj inter ni klopodegas por rekonigi la lingvon
Hodiaŭ matene, mi aŭdis la rezulton de la ricevitaĵoj leteroj
pri Esperanto ĉe Radio Varsovio ,dum la Novembra monato : entute
321 korespondaĵoj =

Germana Demokrata Respubliko	78
Ĉeĥoslovakio	64
Sovetunio	56
Britujo	32
Hungarujo	30
Francujo	11
Finlando	10
diversaj	40

Oni povas konkludi ke; en Francujo, aŭ ne plu estas esperantis-
toj , aŭ ili ne plu kredas je Esperanto ! por tiel seninteresiĝi pri
la grava problemo de Esperanto ĉe la radioj (ĉar, kompreneble, estas
same por la aliaj radio-elsendoj : la statistikoj ne estas pli favoraj.

Mi serioze petegas vin : konsciiĝu pri la problemo, kaj almenaŭ
petu de la stacioj iliajn programojn ; ili ĉiuj ĉiam tre afable res-
pondas ! Persone, mi regule korespondas kun ili , kaj, sen paroli pri
la reala intereso de la afero, mi opinias ke tiu sendado de korespon-
daĵoj devus esti Devo por la veraj Esperantistoj .

Oni ĉiam plendas ke oni ne trovas okazon por praktiki la lingvon
jen okazo tute bona por praktiki perfektan lingvon !

Jen la adresoj de la ĉefaj redakcioj :

Radio Varsovio
Esperanto redakcio
Poŝtkesto 46
PL 00950 VARSOVIO
POLLANDO

Radio Pekino
Esperanto Fako
PEKINO
ĈINIO

Radio Vieno
Esperanto Redakcio
ORF WIEN
AUSTRIO

Radio Vatikano
Esperanto Redakcio
00120 citta del
vaticano
VATIKANO

Radio Roma
ESPERANTO
CP 320
I-00100 ROMA
ITALIO

Svisa Kurtonda Radio
Esperanto Fako
CH 3000 BERN 15
SVISLANDO

A. Chalm

Delegito pri Informada

AŬSKULTU LA RADION EN ...

ESPERANTO KOMPRENEBLE !

UNUIU DE LA NORMANDIAJ ESPERANTISTOJ

KAJ

NORMANDA FEDERACIO J. U.F.E.

KOMUNA ESTRAR-KUNSIDO

La 4an de Decembro 1977, je la 10a horo, okazis komuna kunveno de la estraroj de U.N.E. kaj de la Normanda Federacio por interŝanĝi ideojn kaj spertojn kaj difini, kiel tiuj du komplementaj asocioj povos pli efike kunlabori en la estonto por disvastigi Esperanton.

S-ro Quillaud, prezidanto de U.N.E. unue diris ke, kvankam estus preferinde, ke ĉiuj Esperantistoj aliĝu al nur unu sola organizo, tio bedaŭrinde ne estas ebla, ĉar kelkaj, pro personaj kialoj (opinioj, kotis-prezoj, KTP) ne volas aŭ ne povas aliĝi al U.F.E.

S-ro Gibaux deklaris, ke oni nepre devas informi la novajn Esperantistojn pri la ekzisto de naciaj kaj internaciaj asocioj, kaj instigi ilin aliĝi al ili. Oni devas ankaŭ informi ilin pri la ekzisto de gravaj gazetoj (Heroldo-k,t,p.)

S-ro Tailpied demandis, ĉu kunfandiĝo de la Federacio kun U.N.E. ne estus ebla, despli, ke ne estas sufiĉe multaj aktivuloj en la Federacio.

S-ro Pottier respondis, ke li ŝatus tion, ĉar estus pli bone se ĉiuj aliĝus al nur unu asocio, sed ke tio okazigus multajn teknikajn problemojn malfacile solveblaj (elektoj kaj diskutoj pri U.F.E. aferoj, aliĝo de ĉiuj estraranoj al U.F.E., kaj tiel plu) Tamen povus okazi komunaj kongresoj kun apartaj kunvenoj por ĉiu organizo, kaj en la Normanda Esperanto Bulteno povus esti ("Paĝo de la Federacio" La tuta ĉeestantaro konsentis pri tio kaj eĉ decidis, ke la Bulteno povos esti sendata al la federacianoj ne anoj de U.N.E.

Poste S-ro Lemarchand klarigis pri la nunaj teknikaj problemoj de la Bulteno. Nuntempe la maŝino ne funkcias. Pro tio la Oktobra numero ne aperis ĝustatempe. La sindikato, kiu presas ĝin aĉetos novan ofsetmaŝinon, sed eble la kosto estos pli alta. Nuntempe ni devas pagi tri franfojn por ĉiu stencilo, 8 centimojn por ĉiu foliokaj 3,5 centimojn por la frontpaĝo.

S-ro Lemarchand informiĝos por scii, ĉu ni povos uzi la novan maŝinon aŭ ne. Li ankaŭ eksciis, ke oni povas sendi la bultenon je pli malalta prezo, sed por ĝui tiun avantaĝon oni devus retrovi la numeron de la oficiala deklaro de la Bultenon.

Fine S-ro Lemarchand informis pri la stato de la kaso de U.N.E., kiu enhavis 2263,98 Frs la 17an de Novembro 1977;

T.A.N.E.F.

Ĉu vi jam aŭdis pri "La Naturamikoj" ?, pri "T.A.N.E.F." ?

Eble tiuj, kiuj antaŭ du jarojn partoprenis la ĝeneralan kunvenon en Val de Sŝano, memoras, ke ĝi okazis en naturamika domo, kaj, ke iu esperantista Naturamiko skize prezentis al ili tiun movadon. Esperable, tiuj ne vidis malhelpen, ke la temo estu denove pritraktita en Normanda Esperanto - Bulteno.

"La Naturamikoj" estas internacia movado, kies karaktero estas tute origina. Ĝi naskiĝis en Aŭstrio, en la industria Vieno, ĉe la fino de la 19-a jarcento.

Instruiste konceptis la ideon inviti la vianajn laboristojn forlasi siajn mizerajn loĝejojn en la fulmoplajn trinkejojn per kane ekskursi tra apudaj montoj kaj arbaroj. Kun helpo de manpleno da fervoruloj, li kreis la unuan grupon. Ili sin nomis "La Naturamikoj".

Tuj la movado havis grandan sukceson kaj rapide disvastiĝis en Aŭstrio kaj pli ĝenerale en Germanlingvio.

Malpermesite de la Nazioj ek de 1933, la Asocio postvivis en Svisio kaj praktike nur renaskiĝis en 1945.

Nun la "Internacie de la Naturamikoj" kunigas 14 landajn federaciojn en ĝeneralajn grupojn. Ĝi nombras ĉirkaŭ 350.000 membrojn kaj posedas aŭ mastrumas proksimume 800 domojn.

La movado, en Francio, ne estas tre potenca. Ĝi nur nombras 11.000 membrojn. En Normandio ekzistas sekcioj en Dieppe, Fécamp, Le Havre kaj Rouen.

Kvankam absolute sendependa de ĉiu politika partio, pro historiaj kialoj, la Asocio konservis "laboristecan koloron". Aspiroj pri pli justa ekonomia sistemo, pri paco kaj libereco, pri supermacieca amikeco, SUBTENO AL UZO DE LA LINGVO ESPERANTO, kaj, kompreneble, defendo de la Maturco, estas inter la fiksitaj celoj en la internacia kaj franca asociaj statutejoj.

La siglo T.A.N.E.F. signifas : Turista Asocio Naturamikoj Esperante Fakoj. Ĝi havas oficialan reprezentanton en la internacia direkcia komitato de la Naturamikoj. T.A.N.E.F. eldonas esperantan revuon "La Migranto", kiu aperas 4 foje jare (jarabono 16 F).

En Francio, ekzistas pure esperantista sekcio nomata "ESPERANTO-MIGRANTO", kies sidejo estas en Parizo, al kiu povas ankaŭ aliĝi esperantistoj, kiuj loĝas ekster la pariza regiono.

Membrigo al la Naturamikoj permesas al tiuj, kiuj posedas ties membrekarton, uzi la servojn, domojn aŭ tendarojn de la Asocio.

Por havi pliajn informojn koncerne tiun movadon, skribi al Gilbert LEBEC, 10, rue Jean-Mermoz, 94340 - JOINVILLE-LE-PONT.

LINGVA ANGULO

"Perfektigi estas devo"

SE aŭ ĈU ? Provu ŝtopi la truojn kaj POSTE, seĝd nur poste, rigardu la solvan de la deka paĝo.

- 1- Li ne diris al mi, ... li venos morgaŭ aŭ post-morgaŭ.
- 2- Mi estos libera morgaŭ, ... li venos nur post-morgaŭ
- 3- Mi ne estas certa, ... li prafas en tiu afero.
- 4- Estas dubo, ... li povus fari tiun taskon
- 5- Mi ne povas distingi, ... ~~malnigra~~ tie estas nigra aŭ verda
- 6- Kion mi diras, ... mi volas ekscii, ... la sidloko estas libera aŭ okupita?
- 7- Li povus sveni, .. li restas sola.

NIA VIVO EN ...

7

LE HAVRE

GENERALA KUNVENO

Ĝi okazis la 15an de Oktobro en la Junuldomo.

19 personoj ĉeestis kaj 5 senkulpigis sin.

Jen eroj el la Morala Raporto :

Kursoj : 4 lernantoj finis la unuagradan kurson de S-ro Chalm .

Notinde estas ke unu el la kursanoj, S-ro Jean François Passarella , forlasis Le Havre por ĉirkaŭkuri la terglobo, uzante Esperanton , kiu kiun li studis tiucele ! De la sama gvidanto daŭris la konversacia rondo ĉe la Liceo Porte Océane ; aliparte, S-ino Sery zorgas pri la instruado de ŝia pasintjara lernantino .

Monataj Kunvenoj : kiel kutime , ĉe François 1er, la trian sabaton de la monato . La meznombro de partoprenantoj , kvankam iom malpli alta ol antaŭe , ŝatis la prezentadojn de Gesinjoroj : Gontard, Laney, Lucas, Mercier, Noël, Peltier , Sery kaj Sylvie .

Vojaĝoj de la membroj : en regionaj renkontiĝoj partoprenis = 11 en Rouen (Zamenhoftago) , 5 en Yvetot por la Reĝokuko , 8 vizitis la Generalan Kunvenon de U N E en OUILLY le Vicomte , kaj 3 anoj reprezentis nin ĉe la Generala Kunveno de la federacio en Trouville . Ni menciis ankaŭ la vojaĝon al Grezilono de S-ro Chalm , kun siaj gelernantoj .

Eventoj : Nia Jarfestoj okazis en la ĉambroj de la Junuldomo, kaj arigis 35 personojn . Ankaŭ en tiu ejo estis prezentata la libro ekspozicio de S-ro Lentaigue (el Montpellier)

Akcepto de la Sotanoj : la grava kaj atendata okazaĵo de la jaro estis la vizito de 12 Samideanoj el Southampton , pri kiu estis jam raportita ; ni memorigu interalie ke ni estis akceptataj en la urbo-domo, kaj ke la vespermanĝon partoprenis pli ol 60 personoj ...

Komitataj Kunvenoj : 4 okazis ĉe S-ro Chalm , ĉefe pro la pretigo de la supre menciita evento .

Gazetoj : regule, ĉiumonate aperis niajn artikolojn por anonci la kunvenojn, ja ankaŭ kelkajn pli gravajn , kun informa celo .

Varbo Kampanjo de U.F.E. : oni bedaŭras la mankon de entuziasmo de la Grupanoj . Denove dankinda estas S-ro A.Chalm, pro lia montro fenestro aranĝita laŭ la postuloj de la kampanjo .

Kaso: kvankam restas deficitito ĉi jare, oni jam regajnis iom por ŝtopi la gravan koston pro la akcepto de la Sotanoj . Fine ni konfirmas la ekziston de poŝta ĝirkonto kiu ebligas la inter-pagojn de la kotizojn .

Elektioj : La ĉe estantaro dankas al S-ino Turmel pro ŝiaj laboroj en la sino de la Komitato, atendente ke ŝi revenu kun pli bona sano . La aliaj membroj de la Komitato estas reelektitaj unuanime . F-ino Sylvie Caron transprenas la postenon de Sekretariino .

Tiu seriozmiena kunveno, kiel decas al Generala Kunveno, finiĝis antaŭ bonvena glaso de aperitivo, kiu redonu al ĉiuj la kuraĝon por la nova laborjaro !

Komitato de Havra Grupo

Monataj Kunvenoj : 21.11 = Silvia kutimigis nin je siaj temoj pri strangaĵoj : ni ne dubas ke se,okaze, ia "Fluganta Subiaso " vizi-
tos nian urbon,ŝi estos atestantino pri la evento, kaj, -kial ne ?-
la interpretistino ! Sia elektita temo hodiaŭ: " La Triangulo de
la Bermudoj " ...ĉu tiuj katastrofoj havas rilaton kun ekster-teraj
estaĵoj ? aŭ kun la malaperinta kontinento Atlantido,aŭ ĉu temas
pri meteorologiaj-geologiaj fenomenoj ? ni emas kompreni ke ni
konas la solvon okaze de estonta prelego ...

17.12 = Klara : "Gorgo flegado " Ŝi kondukis nin
al ĉarma kuracurbeto en la Alpoj .Tie, tra la labirinto de la san-
igejoj,ni konatiĝis kun ĉiu ero de la terapio per varmofonto :
ŝpruce,gargaro,duŝo,tra-akvumo de la naztruoj, ktp. ; ĉio ĉi per
sulfurakvo , varma aŭ ne , vaporigita aŭ sub sia likva stato ...
tre bona por la sano , sed dube bona por la gusto !

21.01 = S-ro Roberto Letailleux parolos al ni
pri la " Tria aguloj "

18.02 = Laŭrenca prezentos "Sekurisman "

Reakontiĝo U N E : Nia Grupo gastos, la 5an de Marto ,la Printempan
Kunvenon de la Normandoj ; ni kusu la manikojn !

Urba Manifestacio 78 : Pasintjare, la urbinstantoj organizis gravan
kulturban feston " Juin dans la rue " kies raporton vi povis vidi
ĉe 1^{te}televido . La temo ĉi jara estas " Le Havre, carrefour des
peuples " Neniu konscia Samideano sciante tion, ne povas resti en
la margeno . Nia dinamika amiko Chalm , respondeculo pri la fako
" Esperanto " ĉe la Junuldomo MJC ,atingis ke, en la kadro de tiu
Organismo, Esperanto partoprenu en tiu jara manifestado .

Southampton : Tri Delegitoj el Le Havre partoprenis la festojn pri
la 50a datreveno de la fondiĝo de la Suda Federacio ,en Britio .
Ili raportis jenan informon : La Sotanoj jam rezervis ĉambrojn en
la Universitato de Southampton ,por organizi regionan renkontiĝon
dum Septembro 78,kun partopreno de la Havra Grupo ...

Kursoj : Neniu lernanto enskribiĝis por la elementa kurso de S-ro
Chalm kiu,tamen ,daŭrigas konversacian kurson ĉe la Liceo Porte
Océane . Aliparte, ni menciis ke sep membroj de la Grupo kunvenas
regule por prepari sin por la Kapableca Ekzameno .

Nekrologo : Estas ĉiam korprenme anonci la forpason de Samideanoj ,
kaj, en la malnovaj grupoj , tiuj eventoj ,ho ve ,ofte ripetigas .
En Le Havre mortis, la 10an de Decembro, Samideano Frederic RENAULT
post mallonga malsano .Li estis 69 jara . Fidela membro de S.A.T. ,
ni memorigu ke li estis la fondinto de la Laborista Grupo en
Le Havre dum jaro 1929a .

HELPU LA ASOCIION !

ne forgesu vian jaran kontribucion al U.N.E.

7,00 fr. minimume . Dankon !

c.c.p. : Rouen 283 40 H

Ĉi kune, mi sendas artikolon de OUEST FRANCE, kiu informas pri la akcepto de S-ro RAULT, kiel kavaliro en la ordeno pri "Artoj kaj Beletroj."

Tiu-ĉi distingaĵo juste honorigas pibniron de Esperanto en Lisieux/: efektive, estante instruisto en Manerbe, Sinjoro RAULT estis elektita kiel Prezidanto de Leksovia grupo dum 1934a jaro. Sinjorino RAULT estas ankaŭ agema Esperantistino kaj ambaŭ daŭre sindonas por la disvatigo de Esperanto.

Pri la vivo de nia grupo bedaŭrinde nenio estas menciinda ni ne sukcesis varbi novajn kursanojn, nur 4 personoj kunigas ĉemi ĉiu marde por sin perfektigi en la praktika uzo.

C. MARTIN

LISIEUX.

Lors de sa venue à Cambremer pour la région cantonale des maires, M. d'Ornano, ministre de la Culture et de l'Environnement, a présidé, à la salle des fêtes, une cérémonie au cours de laquelle il a remis la « croix de chevalier des Arts et des Lettres » à M. Fernand Rault, ancien maire de Cambremer, et la « médaille d'argent départementale et communale » à M. Marius Mainfray, qui fut, de 1953 à 1977, conseiller municipal de Cambremer.

A celui-ci, M. d'Ornano exprima la reconnaissance de tous pour son dévouement à la collectivité publique puis il s'adressa à M. Rault après que M. Grandval puis M. Ambroise Dupont conseiller général, eussent évoqué la vie du premier et les « ressources intellectuelles et les talents en tous domaines » du second.

Soulignant que la médaille des Arts et des Lettres est décernée, généralement, aux grands artistes, le ministre de la Culture déclara : « Il importe que, désormais, tous ceux qui ont vocation artistique de retrouver, fragment par fragment, la vieille et antique histoire de nos petites régions, soient distingués ».

Il est vrai que M. Rault, ancien directeur d'école à Saint-Aubin-sur-Mer, membre particulièrement distingué de la Société historique de Lisieux, a consacré toute sa vie à découvrir la culture et l'art du Pays-d'Auge et notamment du canton de Cambremer.

Il s'est affirmé comme l'un des historiens les plus compétents de l'arrondissement.

Mme de Rothschild, maire de Reux, tint à assister à cette cérémonie, étant intervenue personnellement pour que cette distinction soit attribuée à M. Rault.

Deux médailles

KOMUNA KONGRESO de UNUIGO de la NORMANDAJ ESPERANTISTOJ
kaj de la NORMANDA FEDERACIO de U. F. E. :

tiu regiona evento okazos en la Junulgastejo de ROUEN
(Auberge de Jeunesse) kie jam okazis en 1976 - decembro
la Zamenhofa Renkontiĝo.

Do nepre, ek de nun, rezervu liberan tempon por ĝin ĉeesti
SABATON 22an kaj DIMANĈON 23an de APRILO 1978a.

tiu interesplena renkontiĝo prezentos al vi TESPA aĵojn :
(Teatro Esperanto de Parizo) kiun ni jam prezentis al vi
en la lasta numero de la bulteno.

Detala programo, aliĝilo, mapo por facile trovi la kunvenejon,
voĉdoniloj por la estraraj elektoj aperos en la marta numero
de la bulteno. Do ĝis baldaŭ en ROUEN !

Rault

SINCERAJN GRATULOJN !

YVETOT

La kursoj daŭre kontentige funkcias. Ses personoj (el kiuj 2 infanoj en aparta kurso) partoprenas la elementaj kursojn, kaj 4 ĉeestas la kurson por progresantoj.

La 15an de Januaro, la grupo festis per bankedo la 10an Datrevenon de sia fondiĝo. Antaŭ la manĝo, S-ro POTTIER rememorigis al la ĉeestantoj la laborn faritan kaj la sukcesojn atingitajn dum tiuj dek jaroj. Entute 45 personojn partoprenis la ceremonion kiun ĉeestis la Urbestro, Doktoro BOBER, honoprezidanto de la Grupo. Fine de la manĝo, oni kiel ĉiujare manĝis la tradician kukon de la reĝoj en tre gaja etoso, kaj Patro Kristnasko ĝojigis ĉiujn infanojn per donaco de ludiloj.

LINGVA ANGULO (solvoj de la 6-a paĝo)

ĈU estas demanda vorto. Ĉi demandas EN REKTA DEMANDO aŭ EN NEKTA

DEMANDO

Ekz: Mi min demandas: "Ĉu tio estas vera?"

Mi min demandas, ĉu tio estas vera.

Oni ne povas erari se oni aldonas "jes aŭ ne" (do: se oni inkluzivas la du eblajn respondojn)

Mi min demandas, ĉu (jes aŭ ne) tio estas vera.

SE = en la supozo, ke...

SOLVOJ: 1- ĉu ; 2- se ; 3- ĉu ; 4- ĉu ; 5- ĉu ; 6- se, ĉu; 7- se.

Memoru:

Laŭ tio, ĉu la vetero estos bela aŭ ne, mi promenas (Plena Ilustrita vortaro, p. 621)

DISTRA ANGULO

DIVENAĴOJ

1 - Kial vera Kristano estas trezoro ?

2 - Kial estas preferinde ne skribi la daton sur letero ?

(Respondoj ĉi-sube)

2 - Ĉar ĉu la dato ĉi ne estas sendata. (sen-data, send-ata)

1 - Ĉar la estas diamanto! (di-amento)

RESPONDOJ